# Esperanto Angulo

De Yzerbode voor Veurne, Dixmude en Omstreken (19370411)

Fidela al la regulo denove aperas nia «verda» rubriko. Niaj geamikoj havas bonsancon ci tiun fojon car la nuna numero de la IJzerbode estos sendata al ciuj gesamideanoj. Kompreneble kun certa celo.

Sendube neniu malkonsentas pri tio, ke nia rubriko estas grava por nia propagando, tial necesa, kaj krom tio tre interesa. Kredeble multaj personoj, ankau ne-esperantistoj, legas plezure au provas kompreni niajn artikolojn.

Nu konsiderante, ke ni do bezonas nian Angulon, ni instigas ciujn kunbatalantojn legi gin. Tio do signifas, ke la redakcio trovu malgrandan rekompencon pro la afabla disponigo de tuta Esperanto-kolono. Ni esperas kalkuli je via kunlaboro.

Bonan novajon ni povas anonci. Kelkaj eble jam audis. Nia verda familio kreskis. Jes, ni havas novan verdstelulineton. Kia vorto ! Granda vorto por anonci la naskigon de carma bebo, kiu venis en la mondon. Tuj li diris : Saluton al vi karaj patrino kaj patro. Jen, ni vere rajtas esti kontentaj.

Al gesinjoroj Van Hee sinceran gratulon pro la felica naskigo. Ke la eta Gilberto, kresku kiel brasiko kaj rapide lernu nian lingvon estas sendube la deziro de niaj gelegantoj.

Kiel ni hierau priparolis, ni havos la plezuron revidi nian samideanon Sro Stuit, kiu faros proksiman dimancon paroladon kun lumbildoj pri Nederlando. En nia ejo povas lokigi nur 50 personoj ; do prefere la Woumenanoj ne venu viziti tiun vesperon. Eble la salono estus tro malgranda kaj tiuokaze la parolado malpli agrabla. Cetere Sro Stuit vizitos aparte la grupon en Woumen dimance la 18an de Aprilo.

**ESPERANTO-ARTIKLOJ.**

Vi povas trovi en la butiko de la Izerkuriero cion, kion vi bezonas. Ne forgesu foje rigardi la montrofeneston kaj ne hezitu foje malfermi la pordon. Afbalaj fraulinoj volonte informas vin pri la libroj kaj aliaj aferoj haveblaj ce ili.

**NI FUNEBRAS.**

Sinjoro Advokato Michauj el Bulonjo ce Maro forlasis niajn vicojn. Li estas unu el tiuj pioniroj al kiuj ni dankas la grandiozan progreson de nia afero. Ce lia tombo parolis esperantlingve Profesoro Deligny, kiu diris inter alie : Nia amiko konatigis kun Esperanto en 1900 kaj organizis la unuan Universalan Kongreson de Esperanto en Bulonjo, ce maro en 1905. Li restis fidela al « la nova sento, kiu venis en la mondon » gis la morto.

Sro Michaux, vi perlabaris gravan, longan kaj sukcesan taskon. Ripozu pace. Adiau.